

# LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaĵoj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaĵoj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj  $2\frac{3}{12}$ .

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petitolinio. 10 % rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 9 (45)

la 15:an de novembro 1899

IV:a jaro.

## Al niaj abonantoj.

*Antaŭ ol tiu ĉi jaro atingis sian finon, ni juĝas, ke estas nia devo sciigi niajn legantojn pri tio ĉi sekvanta.*

*Ĝi tuŝas la demandon pri la esto aŭ neesto de nia gazeto.*

*Por ke la gazeto povos esti eldonata, estas necese havi monon.*

*La eldonado de la gazeto povas, kiel mona entrepreno, esti rigardata el du vidpunktoj: aŭ kiel afero de ĉiuj esperantistoj, aŭ kiel entrepreno de iu aparta persono.*

*Sed unu afero restas nedisputebla, tio estas la rolo de la gazeto kiel la komuna fokuso de la esperatistaro, kiel la esprimo de la vivo kaj disvolvigo de la lingvo Esperanto. Por konduki nian aferon, nian lingvon antaŭen por fariĝi vivanta forto en la mondo, estas grandege grava tio, ke ni havas komunan organon, unu centran punkton por nia agado ne sole eksteren sed ankaŭ internen. Eksteren estas tre grave, ke ekzistas ia videbla signo de la vivo kaj florado de la lingvo antaŭ la observanta, pli malpli interesata publiko, kies favorajn penson kaj prijuĝon pri Esperanto ni deziras kiel preparon por akiri novajn adeptojn. Internen, la gazeto havas grandan mision por plenumi fortikigante la kredon de ĉiu adepto pri nia ideo kaj farante lin per tio kapabla kun konvinko kaj forto agadi por ĝia disvastigo kaj pliprofundigi lian sciadon kaj lertecon pri Esperanto, samtempe ke li estas ekfajrata al fervoro en la laborado per la ekzemploj de aliaj kaj la sciigoj pri sukcesoj.*

*Montris sin, dum tiu tempo kiam la gazeto jam ekzistadis, ke estas plej oportune ke ĝia tuta administrado kuŝu, se eble, en la mano de unu sola persono. Nur ĉe tia kondiĉo ĝi povas eliradi en akurata tempo, kio estas tre grava por tio, ke la abonantoj ĉiam sentu sin en amikema stato pri la gazeto kaj laŭ sia mezuro laboru por ĝia disvastiĝo.*

Rigardate kiel mona entrepreno la gazeto ĝis nun estadis malfeliĉa. Kaj tiom kiom koncernas aparte tiun ĉi lastan duonjaron, tiuj oferoj, kiujn la gazeto jam kostis al ĝia nuna mona mastro, estis tiel grandaj, ke ili ne kuraĝigas lin al daŭrigo; pro kio li estas malhelpita entrepreni la eldonadon en la venonta jaro. Nur la triono el la abonantaro de la antaŭa jaro nun apogis per abonoj la entreprenon, kiu, sekve, kaŭzis al li rimarkindan malprofiton.

La gazeto sekve senestas ankoraŭ eldonanton por la venonta jaro. La nuna redaktoro sciigas per tio ĉi ke li estas preta preni sur sin mem la eldonadon de Lingvo Internacia dum la jaro 1900 sub tia kondiĉo, ke almenaŭ 500 abonantoj por tiu venonta jaro raportos sin antaŭ la fino de tiu ĉi jaro estanta.

La gazeto elirus do dum la jaro 1900 en neŝanĝita stato, nome per unu 8-paĝa numero en ĉiu dua semajno, kaj la abona kosto estus por tiuj 24 numeroj 4 kronoj.

La budĝeto de ĉiu aparta 8-paĝa numero estas ĉirkaŭe 40 kronoj por la presigo, 25 kronoj por poŝtpagoj de la dissendo de 500 ekzempleroj, aŭ kune 65 kronoj. Sekve la preso kaj dissendo de la gazeto kostus dum la venonta jaro kronojn 1560. Ekster tio ĉi alvenas la kosto de korespondado kaj diversaj elspezoj okazaj.


Plu, ĉar la gazeto eliradas tiel ofte, la redaktoro devas dediĉi tre rimarkindan parton el sia tempo al ĝia administrado kaj prizorgo. Sed ĉar tiu laboro okupas grandan parton el tiu tempo, kiun li alie bezonas por akiri sian rimedon de ekzistado, li povos administri la redaktadon nur ĉe tia kondiĉo, ke la gazeto povos doni al li iom da salajro. La superrestaj 400 kronoj estus salajro de la redaktoro.

Ni tial admonas ĉiujn amikojn de la gazeto Lingvo Internacia, ke, se ili deziras ke la eldonado de la gazeto estu daŭrigota dum la jaro 1900, ili faru tiom, kiom ĉiu povas, por ke tio estu ebla. Kaj la unua kondiĉo estas, ke ni antaŭ la fino de tiu ĉi jaro estos certaj havi 500 abonantojn por la jaro venonta.

Tamen ĉar la lasta numero de tiu ĉi jaro, en kiu ni sciigos pri la fina decido, estos elsendata antaŭ la fino de la jaro, ni petas ĉiun veran esperantiston kaj amikon de la gazeto Lingvo Internacia, ke li, se eble, antaŭ la 10:a de decembro 1899 ensendu al la redaktoro sian promeson pri abono de kiel eble plej multaj ekzempleroj aŭ pri rekta mona subteno en alia formo, se li volas, ke la gazeto aperos dum 1900.

Baldaŭa helpo estas duobla helpo!

*La redakcio.*



## Novajoj.

**"La Biblioteko."** Ni sciigis el Rusujo, ke la Biblioteko ĉesos eliradi. Tiu ĉi sciigo atingis nin per privata vojo, kaj de la eldonantoj ni nenion aŭdis. Sed se ĝi estos konstatita kiel vero, ni povas nur bedaŭri la ĉeson de tiel grava entrepreno. En la nuna tempo nia lingvo bezonas riĉan literaturon, ĉar ĝi devas ne sole vivi, sed ankaŭ kreski.

\* \* \*

ono: "La Libro de l' Humorajo." Ankoraŭ unu fojon ni volas atentigi la amikojn de nia Esperanta literaturo pri tiu ĉi verko, kiun preparas s-ro Lengyel en Szegzárd (Hungarujo). Eldoni librojn en nia lingvo estas bona kaj laŭdinda entrepreno, ĉar en la nuntempa periodo, antaŭ ol ekzistas naciaj plenaj leksikonoj de Esperanto, nia lingvo pleje vivadas kaj efikas per sia literaturo, kies riĉigo devas esti nun nia plej proksima celo. Tial ĉiu, kiu per aĉeto de la libroj aŭ per alia maniero kuraĝigas la verkistojn kaj eldonantojn por plimultigata produktado, kunhelpas al la konstanta progresado de nia lingvo mem. Ni ne dubas, ke ĉiuj esperantistoj akiros la libron de s-ro Lengyel, tiamaniere donante al si plezuron kaj al la afero Esperanta utilon. Ĝi kostas 3 frankojn = 1 rublon.

\* \* \*

**Niaj anoncoj.** S-ro N. O. Lindbäck en Luleå (Svedujo) sendis al nia gazeto anoncon, kiu estas legebla en la lasta paĝo de tiu ĉi numero.

Pro tiu ĉi anonco la eldonanto vizitis la ekspozicion de s-ro L. Li vidis multajn tre belajn ornamojn, inter kiuj la laplandaj precipe altiris atenton.

Ni rekomendas ilin al ĉiuj, kiuj volas doni al vira aŭ virina amiko danacon. Precipe al ĉiuj fianĉoj, kiuj volas doni al la fianĉino belan ornamon kiel kristnaskan donacon. H. B.

\* \* \*

**Pri Vasilij Lvoviĉ Kravcov.** De malmultaj linioj en nia L. I. (n:o 12:a 1898) mi kun malĝojo eksciis pri la morto de V. L. Kravcov, okazinta antaŭ pli ol jaro. Mi bedaŭris ke nur tiel mallonga noteto estis dirita pri V. L., bedaŭras ankaŭ ke mi mem povas nur tre malmulton diri pri tiu ĉi am- kaj estiminda homo.


Mi konatiĝis kun V. L. letere en la jaro, en kiu estis farita la vojaĝo de s-roj Langlet kaj Etzel tra Rusujo; ni interŝanĝis je leteroj pri tiu vojaĝo. Poste nia komencinta korespondado daŭris pli ol jaro, turnadante sin preferege ĉirkaŭ demandoj moralaj kaj religiaj. En la somero 1897 mi vizitis mian korespondanton en Voronej kaj ekkonis lin persone. Mi ekvidis maljunulon kun bela vizaĝo, kiu povus servi je modelo por pentri apostolon. Li loĝis sola, kun monaĥa simpleco, en du tre modestaj ĉambroj, servadita per virino vilaĝana. Oni ne povus kredi al V. L. lian aĝon (70 jaroj); li ŝajnis al mi ankoraŭ vigla, sed lia diro estis, ke li sentas sin lacigita je vivo; ke lia malsano malhelpas lin bone dormi je noktoj; ke nun li jam malvarmiĝis por ĉiuj objektoj kaj demandoj krom tuŝantaj religion kaj Esperanton. . . . Iam V. L. estis oficiro kavaleria, poste li servadis en oficoj elektaj kaj kvin aŭ ses trijaraĵoj vice estis elektita kiel *paca juĝisto*. Li konfesis al mi, ke kelkan tempon li estis multe fortrenata per la morala prediko de L. N. Tolstoj kaj trovis sin sub lia forta influo. Al fino de la vivo V. L., kredeble lacita je serĉado kaj emanta al anima ripozo, turnis sin al kredo je religiista modo. En niaj disputoj pri religio mi ege disiradis kun Kravcov. Mia saĝo agordita matematike ne povis — eĉ se mi tion dezirus — harmonii kun lia mistike religiista rigardmaniero, kun sklava alpreno de aŭtoritatoj kaj arbitraj limitoj starigitaj al penso.

Eĉ por lingvo internacia V. L. insiste serĉadis benon de la pastraro kaj, kiom mi scias, ĉiam vane. Mi antaŭdiris al li tiun malsukceson, ĉar certe ne ekzistas klaso da homoj pli konservema, eĉ malamika al ĉio nova ol la rusa

religiistaro. Kun ĉiaj niaj disputoj V. L. Kravcov ĉiam restis por mi homo de granda morala altireco. Mi vidis en li animon emantan al bono kaj justeco. En Esperanto li ankaŭ vidis vastan ilon de reciproka kompreno, kuniĝo, frateco kaj plibonigo de homoj. En sia malgranda broŝureto li, kun junula varmegeco, proklamis la aferon Esperanto — aferon tutmonda.

Poltava, X. 99.

A. Zinoviev.



### Migrado.

*Laŭ poemo de Maja X. en la sveda ŝerca gazeto "Strix".*

Kvazaŭproza traduko laŭvorta.

Kaj la vivo — ĝi estas do pleje kiel strato,  
maljuna kaj kurba kaj altaĵa strato  
kun domoj kiuj estas grandaj kaj domoj kiuj estas malgrandaj  
kaj domoj kiuj estas luksaj kaj domoj kiuj estas grizaj.

Oni komencas tiel certe, oni kredas ke oni la vojon konas,  
sed kiom ajn oni promenas kaj kiom ajn oni ĉirkaŭrigardas,  
tamen nenien oni alvenas do malgraŭ ĉio,  
— estas do tamen iom malfacile malgraŭ ĉio.


Kaj subite dum oni iras, oni fariĝas preskaŭ duba  
kaj komencas iomete mediti pri la vojo,  
ĉar la stratetoj kuras en ĉiuj ĉiuj direktoj  
tiel nombre kiel truoj en kribrilo.

Tiam estas do iradi kaj vagi kaj returni,  
kaj jen kiam oni returnas, jen povas do okazi  
ke oni renkontas iun solan, kiun oni rekonas,  
kaj haltas kaj atendas ĝis tiu onin atingu.

Tiam okazas ke oni ricevas akompanon vojpece,  
ili do ne havas ja tempon por multe,  
ili iras do apud oni kaj kunparolas iom,  
sed ĝi fariĝas plej nur ofte adiaŭ kaj bonan tagon.

Kaj la suno briladas kaj la pluvo plaŭdas,  
kaj la piedoj paŝas kaj marŝas kaj migras,  
kaj la vojo estas sendube anoncita sur ia domangulo,  
kvankam tion oni ne vidas, antaŭ ol la botoj estas eluzitaj.


Pi Du.



### Epigramo.

"Ho, estu nia viv' ne maskarado!"  
Ekĝemis knabo, kiam lian koron  
Knabin' vundigis per la amludado, —  
Maskigis tamen ĉiam la doloron.

Sigurd Agrell.



## Saludador.

Hispana fabelo.

— Al s-ino *Vivjeja Stefanovna Osetrova* dediĉas la tradukinto. —

Estas en la mondo lando, kie simpla popolo aparte honoras tiun virinon, kiu naskis sep filojn, kaj kredas, ke unu el la sep knaboj devas esti elektita de Dio, feliĉa kaj bona homo. Tiam homon oni nomas *Saludador*, kio signifas Benita, kaj ekkoni lin oni povas per tio, ke ĉe li en la buŝo, en la palato aŭ sur la lango devas esti krucforma signo. Oni kalkulas *Saludador*'on preskaŭ sankta kaj kredas, ke li alportas en sian familion riĉecon kaj ĉian feliĉon, kaj ke li posedas forton, kiu helpas al li eksciadi ĉiujn dolorojn kaj kuracadi malsanulojn.

Tiel pensas la biskajoj — popolo, loĝanta en malproksima Hispanujo. Kaj jen kian fabelon oni rakontas pri unu el *Saludador*'oj.

\* \* \*

En unu vilaĝeto vivis malriĉa homo nomata Sanc, kiu havis grandan familion, konsistantan el edzino kaj ses filoj. Vivi al li estis malfacile kaj li tre ĝojiĝis, kiam naskiĝis ĉe li sepa filo. Unu el ili devas esti *Saludador*, — sed kiu? Sanc alvokis ĉiujn siajn ses knabojn, starigis ilin rekte kontraŭ la suno kaj ordonis al ili malfermi la buŝojn, sed neniu el ili havis krucforman signon, sekve — ĉiuj ili estis simplaj homoj kaj *Saludador* devas esti la novenaskita. La patro ekrapidis rigardi la novenaskitan: li ankaŭ ne havis krucon en la buŝo. Sed tio ĉi nenion signifis: Sanc rememoris, ke la signo de kruco aperas nur tiam, kiam la knabo ellernas legi "Patro nia" kaj "Dipatrino".

Oni nomis la infanon Betiri. Ĉiuj en la domo amis kaj dorlotis lin; sed malfacile estis ankaŭ lin ne ami: li neniun maltrankviligis, estis ĉiam trankvila kaj obeema. Ju pli li kreskis, des pli bona li fariĝadis. Li estis tre saĝa kaj tial baldaŭ komprenis, kion atendis de li la domanoj kaj la tuta vilaĝo. Pensante pri tio ĉi, li fariĝis tre modesta kaj komprenema kiel plenaĝa. Li frue ellernis legi "Patro nia" kaj "Dipatrino", kaj ĉiuj en la vilaĝo ĝojiĝis, kiam oni eksciis, ke sur lia lango aperis signo de kruco.

Betiri sciis, ke li devos kuraci malsanulojn, kaj jen por pli bone scii helpi al ili en malsanoj, li tutajn tagojn vagadis en kampoj kaj arbaroj, elrigardante ĉian herbeton, ĉian ŝtoneton kaj serĉis en ili kuracigan forton. Ofte foriradis li matene kaj revenadis hejmen nur antaŭnokte. Multe da utilo eksciis li dum siaj migradoj kaj dankis Dion por tio, ke li sendis lin en la mondon por helpadi al malsanaj homoj kaj faciligadi iliajn turmentojn.

Dume lia familio komencis vivi senzorge kaj la patro kaj la pli maljunaj filoj forlasis ĉian laboron. "Pro kio ni laboru", pensis ili, "kiam ni ankaŭ sen tio baldaŭ estos riĉaj: *Saludador* alportos en la domon riĉecon kaj feliĉon". La tuta familio vivis ŝulde kaj la patro jam antaŭe ĝojiĝis je tio, kiajn landojn kaj palacojn li havos, kiam Betiri elkuracos de malsanoj kelkajn reĝojn kaj eminentajn sinjorinojn kaj sinjorojn.

Sed la kuraciga forto de Betiri povis aperi nur tiam, kiam li havis 13 jarojn da aĝo. En tiu ĉi tago estis festo en la tuta vilaĝo kaj ĉiuj venis gratuli la novan *Saludador*'on. Kaj jen de tiam komencis kunveniĝadi en la vilaĝon malsanuloj de ĉiuj flankoj. Unue venis al Betiri virino. Ŝi diris al li,

ke ŝi havas fortan doloron en la koro. Betiri metis manon sur ŝia koro, fermis la okulojn — kaj subite klare prezentigis al li loko, kie kreskis herbeto, kiu devis helpi kontraŭ la doloro de koro. Li rakontis al la virino, kie oni povas trovi tiun ĉi herbeton kaj ekinstruis ŝin, kiel fari el ĝi kuracilon. Tiel faradis li kun ĉiu malsanulo: sciiginte pri lia malsano, li metadis sur la malsanan lokon sian manon, fermadis la okulojn — kaj al li tuj prezentigadis tiu loko, kie kreskis ia kuraciga herbo, aŭ vivis sovaĝa besto, el kies galo oni devis pretigi kuracilon, aŭ kie kuŝis ia ŝtoneto kun kuraciga forto. Betiri havis bonan visagon, kvietan voĉon, afablan manon, tiel ke eĉ sanaj volis malsaniĝi, nur por ke li ekkuracu ilin.

Baldaŭ ĉiuj malsanuloj, al kiuj li ekkonsilis kuracilojn alvenis al li kun gajaj vizaĝoj. Ĉiuj ili saniĝis kaj portis kun si donacojn por danki la bonan kuraciston. Estis tiel multe da donacoj, ke la patro de Betiri malplenigis ĉiujn siajn kestojn, por havi lokon ilin meti. Li volis jam kolekti la monon kaj objektojn, sed Betiri sciigis, ke li en nenia okazo prenos pagon por la kuracado, ĉar la kapablecon kuraci li ricevis senpage de Dio. La elkuracitaj de li homoj komencis admoni lin akcepti la donacojn, sed li ĉiam rifuzigadis; tiam ili ekadmiris al lia boneco kaj reportis la donacojn hejmen.

Komence Sanc estis tre malkontenta pro tio, ke la filo ne ekvolis preni la donacojn, kiujn oni alportis al li por la kuracado, sed poste li ekpensis: "Mia Betiri estas tre saĝa. Li rifuziĝis por la unua fojo de la pago intence, pro tio, ke ĉiuj ekparolu pri li. Kiam do oni ekscios pri lia boneco, tiel al li venados ankoraŭ pli da popolo, kaj tiam ni havos ankoraŭ pli multe da mono kaj ĉia bonaĵo." Kaj vere: la sciigo pri la nova Saludador'o ĉirkaŭflugis la tutan landon kaj al Betiri komencis kunveniĝadi tutaj amasoj da malsanuloj. Li ĉiujn elkuracadis, kun ĉiuj estis bona kaj afabla, kiel kun parencaj, — sed ree de neniu prenadis pagon.

Tiam la patro kaj fratoj ekvidis, ke Saludador portos al ili nenian profiton. La patro estis preta ekbati lin pro kolero, sed kion fari: ree devis la patro kaj la pli maljunaj filoj komenci labori, por nutri sin per io. Sed ĉiun fojon, kiam ili komencadis labori, en ilia animo bolis terura kolero kontraŭ Betiri. Baldaŭ ĉiuj en la familio ekmalamis lin kaj decidis, ke li estas parazito kaj maldiligentulo. Finiĝis tio ĉi per tio, ke oni forpelis lin de apud la komuna tablo kaj ordonis al li manĝi sur la sojlo.

— Vi nenion volas fari por nutri la familion, kvankam tio ĉi nenion kostas por vi, diris al li la patro. — Vi ne estas inda por manĝi kun ni ĉe unu sama tablo.

La bedaŭrinda knabo silente sidiĝadis sur la sojlo kaj manĝadis la la manĝorestojn, kiujn oni donadis al li. Kaj dume lia familio tromanĝis bongustajn manĝaĵojn, pretigatajn el provizoj, kiujn la familio prenadis, sekrete de Betiri, ĉe malsanuloj por kuraco.

La patro decidis, ke Betiri estas malsaĝa; li ne povis kompreni, kiel povas saĝa homo rifuziĝi de riĉeco, kiu mem naĝas al li en la manojn. "Li estas simple azeno", diris la patro. Kaj de tiu ĉi tempo ĉiuj en la familio komencis nomadi Betiri'n azeno, laŭ nomo oni lin eĉ ne nomis. — Bonan tagon, azeno! parolis al li la patro. — "Ĉu bone vi dormis, azeno?" La knabo kviete elportadis la mokojn kaj ofendojn kaj neniam plendis.

Iom post iom ne sole la familio, sed ankaŭ aliaj komencis pensi, ke Betiri estas malsaĝulo. Ĉiuj komprenadis, kial koleriĝis je li la patro, kaj baldaŭ la tuta vilaĝo komencis nomi lin azeno tiel same, kiel ankaŭ liaj

domanoj. Tiel ankaŭ restigis por li tiu ĉi nomo. Kiam li iris helpi al iu malsanulo, ĉiuj parolis: "Jen iras la azeno!" Kiam li faris bonan faron, oni parolis pri li: "Azeno savis homon... Azeno elkuracis patrinon, kiu havas ses idojn".

Longan tempon toleris Betiri la ofendojn kaj riproĉojn, fine li ne eltenis: kolektis sian malriĉan veston kaj foriris el la domo. Li loĝiĝis en arbaro, kiu kreskis sur alta monto. Tie estis dometo, kie loĝis antaŭe arbara gardisto, kaj Betiri komencis loĝi en la dometo. De tiu ĉi loko estis vidata la parenca vilaĝo, ĉirkaŭe bruis la verda arbaro, kaj de alta maljuna kverko, kiu staris apude, oni povis vidi la larĝajn, bluan maron. Betiri ĉiam sidis sur la benko apud la dometo. Tien ĉi alvenadis al li malsanuloj, li kuracis ilin, kiel antaŭe kaj kun ĉiuj estis bona kaj afabla. Al tiuj, kiuj estis tre malsanaj, li mem deiradis de la monto, por ke ne devigi ilin supreniradi.

Baldaŭ Betiri elkuracis ĉiujn malsanulojn en la ĉirkaŭaĵo kaj tial li estis ĉiam sola. Pri li oni komencis eĉ forgesi. Sed jen unu fojon, kiam Betiri sidis antaŭ sia dometo kaj rigardis la parencon vilaĝon, subite li rimarkis, ke en la vilaĝo fariĝis ia tumulto. Baldaŭ li ekvidis, ke laŭ la granda vojo iras en lian flankon amaso da homoj; ĉiuj ili estas vestitaj en silkon, veluron, ornamitaj de oro, ĉiuj havas multekostan armaĵon, ĉiuj rajdas sur belaj ĉevaloj kaj antaŭ ili iras lia maljuna patro. La riĉa rajdantaro venis al la dometo. Tiam la patro de Betiri ekmontris la filon per fingro kaj diris al unu el la rajdantoj, ke tio ĉi estas Saludador. La rajdanto turnis sin al Betiri kaj diris al li, ke la reĝedzino hispana estas jam antaŭlonge malsana, ke ŝin kuracadis ĉiuj kuracistoj, kiuj nur estis en la mondo, sed nenia povis ŝin elkuraci, kaj jen la reĝo, ekaŭdinte pri Saludador, ordonis alkonduki lin al la malsanulino, por helpi al ŝi. Poste la rajdanto ordonis al Betiri tuj prepari sin kaj veturi kun ili en la ĉefurbon, kie loĝas la reĝedzino.

(Daŭrigo).




## Vidaĵo.

Kelkfoje, pasinton kun pens' enigita,	Ho, homoj! Di' via Ĉiela, la bona
Mi vidas pentraĵon de temp' malproksima:	Ja inter vi limojn per gentoj ne scias;
Preĝejo grandega kaj luksa, digita	Egale je ĉiuj per Lia ordono
Per multo da homoj, ar' unuanima.	El klara ĉielo la suno radias!
Mi aŭdas, humile la dioservanta	Vi estu do inter si, homoj, en amo,
Ĉi vortojn sankteĝajn en la preĝej' legas:	Kaj kiel fratar' vivu kune! Memoru
Vi ĉiuj — infanoj de Dio Vivanta,	Ke per malpaciĝo, disputo, malamo
Kaj Li, via Patro, vin gardas kaj flegas.	Vi Dion, la Patron, jam ne malhonoru!

Mi vidas, jen larmoj ĉe multaj briletas,  
Sinceraj de ĉionpardon', amo-larmoj;  
Mi aŭdas, — ekĝemoj sin tempe elmetas,  
Mi aŭdas, — verŝiĝas petegoj tre varmaj!...

Narovlo, Minska gub., 30. VIII. 1899.

Tradukis Mozes Goldberg.



### La espero.


Multe la homo parolas kaj sonĝas  
 Pri tagoj pli bonaj de tempoj donotaj,  
 Al la pli bona, feliĉa li celas,  
 Melestimante la bonojn estantajn.  
 Maljuniĝas la tempo kaj rejuniĝas —  
 La hom' — atendadi neniam li ĉesas.

L' espero la homon en vivo kondukas:  
 Ĉirkaŭ la gaja la knabo ĝi flugas,  
 Kaj la junulon ĝi grande fortigas,  
 Maljunulo ankaŭ ĝin ne faligas:  
 Finante malfacilan kuron en tombo,  
 Li metas esperon ankaŭ post tombo.

“Homo! Saĝo via kreis neniam  
 Penson pli malveran kaj ridan,  
 En via koro voĉo parolas,  
 “Vi por pli bona naskiĝis.” —  
 Sed kion la voĉo interna parolas,  
 Ĝi la esperantan animon ne trompas.

Berdiĉev, Junio, 1899.

Julius Levik.



### Informejo de esperantistoj.

**Saĝo de adreso.** La adreso de D-ro *Ad. Ebner* estas de nun: Lobeckstr. 14<sup>a</sup>, *Königsberg* en Pr., Germanujo.

**Korespondadi** kun esperantistinoj de ĉiuj landoj deziras s-ro *Aleks. Zakrjevski* en Arĥangelsk, Rusujo.

**Ligo de Gastamo.** S-ro Aleksandro Zakrjevski, kies adreso estas: Rusujo, Arĥangelsk, strato Troickij prospekt, domo de Popovoj, petas ĉiun esperantiston vizitantan Arĥangelsk veturi rekte en lian logejon, kie oni trovos, kompreneble senpage, ĉion necesan.

## ANONCOJ.

 **N. G. Lindbäck,** 

juvelisto en Luleå (Svedujo),

rekomendas sekvantajn laplandajn ornamojn:

**Zono** el ledo kaj drapo por viroj kun 18 grandaj arĝentaj surornamoj, prezo: de 40 ĝis 130 kronoj.

**Zono** el ledo kaj drapo kun 20 arĝentaj surornamoj, prezo: 20 ĝis 100 kr.

**Kulero** el arĝento, " 8—16 "

**Pipo** el arĝento, " 10—16 "

**Broŝo** el arĝento, " 3—20 "

**Horloĝa ĉeno** el arĝento por viroj, prezo: 8 kr.

**Tia sama por virinoj,** " 6 "

**Ringo** el arĝento por virinoj, " 3 "

" " oro, prezo 15—20 "

Monon oni povos sendi plejbone en franca, germana, sveda kaj angla papera mono aŭ per poŝta mandato.

Ĉiujn artikolojn mi sendas en rekomendata letero.

**N. O. Lindbäck.**

Adreso: Luleå (Svedujo).

Ĉe la **Klubo Esperantista en Upsala** estas aĉeteblaj:

**La literaturisto kaj lia fianĉino.** Rakonto de Emelie Flygare-Carlén. Tradukis *Otto W. Zeidlitz*. Kostas 65 centimojn.

**Du Mirrakontoj** de *Otto W. Zeidlitz*. Kostas 40 centimojn.

**Jarlibro Esperantista 1897**, eldonita de la *Societo "Espero" en S. Peterburgo*. Kostas 1 frankon.

Ankaŭ alian literaturon esperantan oni povas akiri ĉe la Klubo Esper. Upsala, kiel ankaŭ ĉe D-ro Zamenhof.

### La kumiso-eksport'

neniam difektiĝas. Oni povas ĝin ricevadi dum la tuta jaro. Broŝuro (en rusa lingvo) oni ricevas senpage. Adreso: St. Smyŝ-ljaevka Samaro-Zlatoust. jel. dor. Al s-ro *B. Postnikov*.